

Unu el la unuaj kvin malaperoj estis tre grava, ĉar la plejparto de la estajoj mortis. Ĝi okazis antaŭ 250 milionoj da jaroj (ĉe la limo Triaso-Permio). Kaj ŝajnas, ke efektive ankoraŭ pli granda meteorito ol tiu de *Chicxulub* falis tiutempe sur la Teron verŝajne en Patagonio, ekstrema parto de Sudameriko. La informoj pri tio estas ankoraŭ tro disaj, ne sufiĉe detaligitaj, pro tio ne eblas precizigi ilin. Sed la dinosaŭroj profitis la okazon por disvolviĝi kaj okupi la tutan Teron.

Tiu rimarko kondukas la tria demando: kio okazis post la falo de la Meksika meteorito?

Sur la kontinentoj la malapero de la dinosaŭroj ebligis la disvolviĝon de la mamuloj, kiuj jam ekzistis antaŭ la falo de la meteorito. Sed pro la ĉeesto de la dinosaŭroj la tiamaj mamuloj estis malgrandaj kaj malmultnombraj. Kiel antaŭe dirite, ili sen tro da problemoj postvivis la katastrofon manĝante radikojn, insektojn. Sed tio sufiĉis, ke ili disvolviĝis siavice kaj invadis la tutan planedon.

Kio do okazintus, se la meteorito ne falintus? Ĉu ni homoj estus ĉi tie? Verŝajne ne, sed estas tre malfacile konjekti pri tio. Oni tamen povas aldoni lastan kaj ĝeneralan rimarkon: laŭ ĉio, kion ni scias, ni devas konstati, ke meteoritoj grave rolas: ili kontribuis ne nur en la pratempoj al la apero de la vivo sur nia planedo, sed ankaŭ en la postaj epokoj al la evoluado de tiu vivo. Sed eĉ ĝis la XIXa jarcento oni ne kredis, ke ŝtonoj el la spaco povas fali sur la Teron!

Pro tiuj ĉielaj ŝtonoj, antaŭ kelkaj milionoj da jaroj, iu stranga mamulo aperis el inter la mamuloj kaj nun demandas sin, pro kio kaj por kio ĝi estas ĉi tie kaj kion ĝi faraĉas - stranga mamulo efektive. Ĉiu el ni estas ero de tiu stranga specio, kies nomo estas homo. Tiu rimarko estu la finfina.

Adreso de la aŭtoro:

Jacques JOGUIN  
5, Impasse du repos  
FR 38100 GRENOBLE  
FRANCIO

## Internacia Ortografio

Aulo MINELL (FI)

Enkonduko

Tiu ĉi artikolo interrilatas al la *Kolektado de vortoj por belarta vortaro*, publikigita en *Scienca Revuo* 46 (1995)(1). Ĉi tiu nova artikolo intencas doni konsilojn pri la literumo de fremdvortoj kaj prononcado de Esperanto-literoj.

Unue mi volas klarigi, kial mi eldonis la libreton *Internacia ortografio* en 1973, kaj poste, kiun avantaĝon ĝi donas por studi la elparolon de Esperanto.

La intencoj komenciĝis pro jenaj sinsekvaj informoj en la revuo *Esperanto*:

(1968) p. 160: "Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-problemo. Propono de Hindujo al Unesko pri la lingva problemo ... rekomendas, ke la Ĝenerala Direktoro organizu kaj kunordigu esplorojn kaj studojn sur la kampo de lingvistiko, kiuj koncernu praktikajn reformojn por trovi komunan skribsistemon por interligi la popolojn".

(1969) p. 5: "Nova Iniciato pri Alfabetoj, lanĉita el São Paulo. Preskaŭ samtempe kun tiu propono kaj ŝajne sendepende la ĝenerala konsulo libana en São Paulo, d-ro Joseph Naffan, lanĉis sian projekton pri monda kongreso en Biblos (Jbei), urbo rigardata kiel naskiĝloko de la alfabeto skribado. Transprenis ĝin tuj la Kultura Unuiĝo Brazila-Libana, la Urbodomo de Biblos en Libano kaj la grava institucio Brazila Societo por la Progreso de la Scienco. Nelonge poste aldonis sian apogon ankaŭ la Konsilio de Rektoroj de Brazilaj Universitatoj, la Societo de Uzantoj de Elektronaj Kalkuliloj kaj la Inĝeniera Instituto de São Paulo".

(1969) p. 43: "Okazos kongreso pri skribsistemoj. ... En ligo kun kongreso la Universitato de São Paulo proponos du premiojn de respektive \$3000 kaj \$1000 usonaj por la plej bonaj verkoj pri temo rilatanta al alfabetoj kaj skribsistemoj".

(1970) p. 140: "Ortografioj".

(1971) p. 132: "Loke-fake. Lingvistiko. En Burg Wartenstein (Aŭstrujo), de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1970, okazis simpozio 'Al la priskribo de la lingvoj de la mondo'. La simpozion partoprenis lingvistoj el Aŭstralio, Britujo, F.R.Germanujo, Francujo, Hindujo, Japanujo, Meksiko, Nederlando, Sovetunio, Usono. Ili faris rezolucion dediĉigi du jarojn kiel preparan stadion por priskribi la lingvojn en la tuta mondo".

(1971) p. 207: "Loke-fake-persone. Usono. Prezidanto Nixon proklamis en aŭgusto la jaron 1971 kiel 'Jaron de Lingvaj Malplimultoj tra la mondo'. Li atentigis, ke pli ol du mil lingvoj ankoraŭ ne posedas alfabeton aŭ skriban formon kaj instigis ĉiujn apogi tiujn lingvistojn, kiuj laboras por krei skribajn lingvojn kaj tiel forigi la izolitecon de la koncernaj popoloj".

Tiuj ĉi informoj donis al mi instigon por ekkomenci la studadon de la afero, kaj mi elektis jenan vojon: bazi la laboron sur la esperanta ortografio, supozante ĝin ekzakta, kaj mi faris ĝin laŭ jena mia koncepto.

#### LABORPRINCIPOJ lau INTERNACIA ORTOGRAFIO (1973)

##### "Klariga Ĉapitro 1 (p. 5):

Kaŭze de tio, ke Zamenhof genie elektis por Esperanto la plej mezajn kaj la plej gravajn sonunuojn, kaj ke la lingvo estas preskaŭ perfekte fonema, devas la internacia ortografio baziĝi sur la fundamenta Esperanto-literaro kaj sonaro. La ortografio baziĝu al la sufiĉe senŝanĝa kaj simpla sonaro, kiel en Esperanto, kun kompletigo laŭ la priskriba sistemo pere de la teknikaj helpsignoj. ... Nuntempa, malnova, fonetika sistemo estas tre komplika kun multaj neordinaraj literoj."

##### "Teknikaj helpsignoj (p-oj 1, 2, 17 kaj 18):

1. La interpunkcioj pere de vertikala streketo.
2. Meza vokalo; sonunuoj kun la rondaj lipoj [ekz. la hungara: magyar]; sonunuoj kun la rektaj lipoj; meza sonunuoj, duonkonsonanto; diftongo; triftongo [ekz. la ĉina].
3. Meza konsonanto; u-kolora konsonanto; konsonantkuniĝo; aŭ apartenas al la sama silabo aŭ estas prononcata kiel en la sama vorto.
4. Duonakcentita; vortakcento; akcentita, esperanta; forte

akcentita; tre forte akcentita.

5. Malforta, malklara kaj duonmallonga sonunuoj; forta, klara kaj duonlonga sonunuoj; malklara, raŭka sonunuoj; knaranta sonunuoj.

6. Duonlonga; duonmallonga; longa, esperanta; kvaronmallonga; duoble longa; preskaŭ duoble longa; trioble longa; kvaroble longa. [ekz. en la finno-ugraj lingvoj].

7. Senvoĉa; malmola, funda, (u-kolora); duonmalmola, duonfunda, (iomete u-kolora); mola, alta, (j-kolora); voĉa; duonvoĉa.

8. Dentala; proksime dentala; interdentalaj; forte dentala vokalo; forte susura, ŝuŝa konsonanto; nazala; ŭ=u en diftongo kaj en triftongo; j kiel la lasta litero en la silabo = i en diftongo kaj en triftongo; gorĝa; proksime gorĝa; uvulara; ĥ = forte prema, velara h-konsonanto.

9. Elspira; enspira; kluzfonemo; malforta kluzfonemo, premfonemo; komenca kluzfonemo, premfonemo; antaŭvorta kluzfonemo, premfonemo; malforta komenca kluzfonemo; ŝmacfonemo [ekz. afrikaj indiĝenlingvoj (kvin diversaj)]; malforta ŝmacfonemo.

10. Alttona; tre alttona; vort- kaj fraztono; malalttona; tre malalttona; leviĝa tonoj; malleviĝa tonoj; malleviĝa-leviĝa tonoj; leviĝa-malleviĝa tonoj. [ekz. la ĉina]."

##### "Vokaloj (p-oj 19 kaj 20):

La vokalsistemo havas multe pli diversajn variaĵojn ol Internacia IPA-sistemo kaj Finno-Ugra Sistemo kune."

##### "La konsonanttabelo (p. 21):

La konsonantsistemo havas multe pli diversajn konsonantojn ol Internacia IPA-sistemo kaj Finno-Ugra Sistemo kune.

##### Jen glosoj pri konsonantoj sur vertikalaj linioj:

A...Ĉ. Labialoj; D...G. Dentaloj; Ĝ...Ĥ. Gingivaloj; I...J. Palataloj; Ĵ...L. Velaroj; M...O. Laringaloj.

A, B. bilabialoj; C, Ĉ. dentallabialoj; D. interdentaloj; E. postdentaloj; F. antaŭalveolaroj; G. mezalveolaroj; Ĝ. postalveolaroj; H. kakuminaloj; J. antaŭpalataloj; Ĵ. mezpalataloj; K. postpalataloj; L. uvularoj; B, Ĉ, Ĥ, O. molaj.

### Jen glosoj pri konsonantoj sur horizontalaj linioj:

1...2. Plozivoj; 3...7. Frikativoj; 8...11. Afrikatoj; 12. Nazaloj; 13...20. Likvidoj.

1. fortaj plozivoj; 2. malfortaj plozivoj; 3. spirantoj; 4, 5. duonkonsonantoj; 6, 7. siblajoj; 6. neŝuŝaj siblajoj; 7. ŝuŝaj siblajoj; 8...9. neŝuŝaj afrikatoj; 10...11. ŝuŝaj afrikatoj; 8, 10. fortaj afrikatoj; 9, 11. malfortaj afrikatoj; 13...14. tremantaj likvidoj; 15...16. duontremantaj likvidoj; 13. tremantaj likvidoj (2-frapaj); 14. forte tremantaj likvidoj (4-frapaj); 15. netremantaj likvidoj (0-frapaj); 16. unufrapaj likvidoj (1-frapaj); 17...20. lateraloj; 17. elspiraj lateraloj; 18. helaj lateraloj; 19. duonfundaj lateraloj; 20. fundaj lateraloj."

### Zamenhof pri la transskribo

*La Esperantisto* (1891), p-oj 88...92: "Pri la transskribo de alilingvaj sonoj. La alfabeto de nia lingvo konsistas el 28 literoj, kiuj servas por esprimi la sonojn la plej multe komunajn al ĉiuj plej gravaj lingvoj. Tiuj ĉi 28 sonoj ne ekzistas ie aparte en formo difinita kaj severe limita; ili estas post longa pripensado kaj provado elektitaj el la grandega nombro da diversaj sonoj trovataj en la diversaj homaj lingvoj. Enpreni en nian lingvon ĉiujn sonojn, kiuj ekzistas en ĉiuj lingvoj, estus absolute ne eble, kaj se ĝi eĉ estus ebla - ĝi estus neoportune [neoportuna]. La nombro de la sonoj estas tute senlima kaj la nuancoj de unu sama sono en malegalaj lingvoj estas tiel multaj, tiel malfacile difineblaj aŭ diferencigeblaj, ke neniu, se li eĉ konus perfekte ĉiujn lingvojn de la tuta mondo, neniam povos diri eĉ proksimume, kiom da sonoj ekzistas en la homaj lingvoj. ... Sed iafoje ni estas en la situacio, ke ni devas esprimi ne la signifon de ia nomo aŭ fremda vorto, sed ĝian precizan sonadon, kaj tiam ni devas figure prezenti sonojn, kiuj en nia alfabeto ne havas por si literojn. Kion tiam fari? ... Sed en la lingvo Esperanto tiu ĉi granda, kvankam natura, manko ekzisti ne devas. La celo de nia lingvo estas, servi kiel ligilo inter la popoloj, kaj tial ĝi devas havi la eblon esprimi la sonojn de ĉiuj lingvoj. Ni jam diris, ke enpreni ĉiujn sonojn en nian alfabeton estus tre maloportune, - kontraŭe, en la alfabeto ellernota de ĉiuj esperantistoj devas sin trovi sonoj nur tute klaraj, difinitaj, por ĉiuj bone ellerneblaj; sed ekster la alfabeto pure

esperanta ni devas havi ankoraŭ provizan [en rezervo kiel eventuala anstataŭaĵo] alfabeton por fremdaj sonoj; tiu ĉi proviza alfabeto por la amaso de esparantistoj estas tute ne bezona kaj neniu devas ĝin lerni; ĝi ekzistas nur por la filologoj kaj servas al ili kiel kondiĉa [konvencia] rimedo por esprimi klare kaj unuforme la sonojn ne trovatajn en nia lingvo." - *Letero al Deligny* (1901-01-11), *Oficiala Vortaro* (O. V.) p. 575.

Fonetiko. "Pri la prononco de Esperanto. La elparolado de Esperanto estas tute konforma (kompreneble krom la supersignitaj literoj) al la latina elparolado, kiu estas uzata en mia lando." *Lingvaj Respondoj* (L. R.) p. 57.

Jen opinio pri prononcado de Esperanto el *Scienca Revuo* (1970), p-oj 104...106:

"Esperanta prononco, Prof. John Adcock (Wellington, Nov-Zelando) ... Granda merito de nia lingvo estas, ke oni ne bezonas lerni multajn regulojn, sed povas apogi sin sur logiko. Neniu alia lingvo estas tiel konsekvenca laŭ strukturo. Kiam ni devas fari elekton inter du lingvaj formoj, ni nepre agu laŭ la logiko. Do pri prononco ni demandu nin ne pri la nuntempa modo aŭ kutimo, sed pri la principoj, kiuj plej bone akordas kun la spirito kaj ĝenerala strukturo de la lingvo. Tiurilate mi sugestas kelkajn kriteriojn por gvidi la elekton de prononco-maniero:

1<sup>e</sup> Maksimigu la diferencon inter similaj vokaloj kaj tiel evitu konfuzon eĉ kiam oni malbone prononcas.

2<sup>e</sup> La elektita formo estu trovebla sufiĉe vaste en la naturaj lingvoj de la mondo kaj ne estu malfacile prononcebla por iu popolo.

3<sup>e</sup> Evitu formojn kiuj facile emas al misprononco, speciale emu uzi diftongojn anstataŭ puraj vokaloj. Kaj logiko kaj la Zamenhofa konsilo postulas, ke ni uzu diftongojn nur kiam la literumo klare indikas tion. Du apudaj vokaloj ne indikas diftongon kiel ofte okazas en naciaj lingvoj. Por havi diftongon oni devas uzi vokalon kun konsonanto. La konsonantoj j kaj ŝ havas vokalan funkcion apud vokalo, sed ne povas esti la bazo por aparta silabo. Multaj Esperantistoj eraras tiurilate pri la prononco de 'tuj' kiu devas esti unu silabo, ne du (tu-i)...

"...Ĉu tiaj rekomendoj estas akcepteblaj laŭ la opinioj de konataj esperantistoj? Kiel ni jam rimarkis, pri la vokaloj a, i kaj u estas sufiĉa interkonsento pri la prononco, la grava problemo [?] estas pri e kaj o. Zamenhof konsilis nek vastan nek malvastan sed mezan..."

"...Kalocsay kaj Waringhien en sia Plena Gramatiko raportas pri la reguloj de Ĉefeĉ kaj de Wüster. Tiujn regulojn ili pligrandigis ĝis kvar! Ni devas kontraŭstari tian nenecesan komplikigon de nia lingvo. Ĉu ni devas senreziste akcepti la neplanitajn rezultojn de senkonscia agado? Jen la vojo al la kaoso de la naturaj lingvoj. Zamenhof konsilis unu solan normon por ĉiu vokalo, sed permesis sufiĉan grandan variadon ambaŭflanken, tiel ke la fakto, ke ne ĉiu nacio tutsimile parolas ne gravas por la kompreno. Ni celu al la normo, sed ne malesperu kiam ni ne precize kaptas ĝin. Sed ja estu nur unu normo po vokalo. Por e kaj o tiu normo prefere estas la vasta formo kiu taŭge lokiĝas en la fonetika skemo kaj similas al Zamenhofa parolo."

"Notoj de la Redakcio ... Rilate al la demando pri longeco kaj mallongeco de la vokaloj en Esperanto, A. D. Atanasov esprimas sekvan opinion en *Bulgara Esperantisto* (1969) n-ro 3/4: "Iuj aŭtoroj de gramatikoj aŭ de prilingvaj studoj havas inklinon starigi regulojn pri okazoj, kiam oni elparolu vokalon pli longe. Tiaj reguloj, laŭ mi, ne estas necesaj. Se pro fiziologiaj kaŭzoj aŭ pro bezonoj de intonacio iuj fonemgrupoj trudas plilongigon de vokalelparolo, tio okazas nature, spontane, sen intenco - kaj sen sekvado de ia preskribo. Montrado de la okazoj, kiam aperas tia longigo, povus havi nur konstatan kaj klarigan, ne tamen preskriban karakteron."

#### Komentario

Akcento. Laŭ PIV "plifortigo de la voĉo en la prononcado de unu silabo en vorto: en E-o la akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo<sup>z</sup>".

La akcento estas pli forta, pli laŭta prononco. Senintence: duonakcento, kromvorto-akcento, frazo-akcento kaj kontrasto-akcento.

Fonemo. Laŭ PIV "la plej malgranda fonologia unuo"; fonemo = sono (prononco = elparolado); ekz. en Esperanto voĉa/senvoĉa,

ŝuŝa/neŝuŝa, sed tute ne alttona/malalttona kaj tute ne longa/mallonga.

Longeco. Reguloj pri la longeco ne estas necesaj. En la akcentita, antaŭlasta silabo oni iomete tiras la vokalon, se ĝi estas la lasta sonunujo en la silabo. La longeco, kiun oni aŭdas, ne estas absoluta laŭ mekanikaj mezuriloj, sed subjektiva tiel, ke oni aŭdas longecon de vasta 'mezurite longa' a kaj malvasta 'mezurite mallonga' i proksimume egale longaj. En finno-ugraj lingvoj ekzistas ok diversaj longecoj de vokaloj, ekz. en dialektoj de la samea (la lapona lingvo el la plej norda regiono de Eŭropo) oni povas aŭdi la ok longecojn.

Sono. Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita, ekz. **duoblajn** konsonantojn oni elparolu tiel kiel ili estas skribitaj, oni rimarku elano/ellano (e-la-no/el-la-no), elasta/ellasta (e-las-ta/el-las-ta), elatero/ellatero (e-la-te-ro/el-la-te-ro), forumo/forumo (fo-ru-mo/for-ru-mo), misalo/missalo (mi-sa-lo/mis-sa-lo), misilo/missilo (mi-si-lo/mis-si-lo), ..kk.. = ..k+k.., ng = n+g, ng ≠ ŋ. Oni celu klaran kaj sufiĉe simplan normon, sed ne malesperu kiam oni ne precize kaptas ĝin. La finna ekz. estas preskaŭ tute fonema lingvo kiel esperanta, kaj ĉiu finno scias kiamaniere elparoli la normlingvon, vidante ĝin skribita, malgraŭ tio, ke la dialektoj ne havas ĉiujn sonunuojn de la normlingvo kaj ke la normlingvo ne havas ĉiujn sonunuojn, kiujn havas la dialektoj.

Strukturo. Unu sola normo por ĉiu vokalo kaj konsonanto. Ne dialektoj, ĵargono, idiomato kaj slango en Esperanto. Ekzistas nur bona- kaj malbona regado de la lingvo, kaj oni celu iom post iom perfektigi je la regado. Kiam oni akceptas fremdvortojn el aliaj lingvoj, oni devas profunde studi ĉu la vorto konvenas kun la strukturo kaj sonaro de la lingvo.

Tekniko. Maniero uzi la parolorganojn. En la 15-bilda bildserio mi celas priskribi, laŭ simpligita maniero, pozicion de la parolorganoj je la respektivaj esperantosonoj.

En la granda bildo mi prezentas proksimume la kunagadajn punktojn dum la prononcado. La voĉorganoj formas komplikan sistemon kune kun la ĉefpartoj lipoj (1.), dentoj (2.), lango (3...6. L), malmola (5.) kaj mola (6.) palato, buŝo- (III), nazo- (IIII) kaj

faringokavoj (II), laringo kun voĉkordoj (7. I), trakeo (7.), pulmoj kaj diafragmo.

Laŭ mia sperto ĉe la lernado de la sonoj ne sufiĉas nura aŭdado; ankaŭ se ekzistas perfekta modelvoĉo, necesas tamen vidi la bildojn kaj legi la klarigajn tekstojn pri la prononctekniko. Krome oni rimarku, ke la lingvo havas klaran, streĉitan artikulacion kun streĉitaj voĉmuskoloj. Ekzistas ankaŭ tiaj lingvoj kiuj havas malklaran, malenergian artikulacion kun malstreĉitaj voĉmuskoloj. Notu bone, ĉu oni formas la sonunuon kun rektaj aŭ kun rondaj lipoj, ĉar tio efikas forte.

Tono Variado de la altaj kaj malaltaj tonoj. En E-o oni evitu ĝin, ĉar kaŭzas konfuzon inter diversnaciaj parolantoj, pro malegala tonsistemo en la naciaj lingvoj.

Unueco. E-o estas konsekvenca laŭ strukturo kaj prononco.

Vasteco. Vasteco = koloro. Ĉiuj unuopaj vokaloj havu nur unu koloron, vastecon. Movoj de lango supren kaj malsupren formas la vastecon. Esperanto havas tri gradojn. Ekzistas naciaj lingvoj kun 2...6 gradoj. Krome, kune kun la vasteco, lango movas ankaŭ atauen kaj malantaŭen, formante en diversaj lokoj la vastecon. La vasteco, loko kaj longeco ne devas obei la regulojn de la grandaj nacilingvoj.

#### Konkludo

Mia iama studado por *Internacia Ortografio* havas socisciencan karakteron. Kvankam la laboro restis neperfekta kaj mankhava - pro la malkreskanta intereso de la oficialaj partoprenantoj pri la afero - ĝi tamen donas helpon por elekti plejeble konvenajn vortojn por *Belarta Vortaro*.

Kaj la plejbona frukto de la laboro estas, ke mi rimarkis la nombbron de la sonoj preskaŭ senlima en diversaj lingvoj. Vera miraklo estas kiel lerte infaneto lernas dum siaj unuaj aĝjaroj, en plenaĝo kontraue iamaniere stoniĝas la sonoj de la lingvo(j), kiu(j)n li/ŝi lernis dum la infananaĝo. La stoniĝintaj sonoj malhelpas lernadon de novaj lingvoj en plenaĝo.



El la antaŭmenciita oni trovas multajn vere bonajn kaj indajn proponojn kaj konsilojn por ni praktikantoj de la lingvo, kaj pro tio

mi krome konkludas jenon: regulojn pri la prononcado oni donu ŝpareme kun malmultaj ordonoj, laŭ la modelo de Zamenhof, vitante la influon de la gepatra lingvo kaj de fremdaj lingvoj lernitaj antaŭ E-o. Oni rimarku, kiel malfacile kapablas plenaĝulo imiti la delikatajn nuancojn de la lernata lingvo. Estas vera stultajo doni tiujn regulojn, kiuj estas tute sensignifaj kaj vanaj por E-o. Finfine oni rimarku, ke E-o estas jam memstara lingvo, kiu vivas kaj evoluas laŭ sia propra maniero, ne laŭ kutimo de iu granda lingvo.

Precipe profesiaj lingvistoj-fonetikistoj, kiuj gvidas kaj kulturata ĉi-kampe, donu siajn konsilojn nur post vere profunda kaj neŭtrala studado pri la temoj. Troveblas multaj kompatindaj kazoj, en kiuj altgradaj, profesiaj lingvistoj donis misgvidajn konsilojn, se ni taksas la aferon el la vidpunkto de la Zamenhof-instrukcioj. Mi nur klopodas vekti esperantistojn pripensi tiun aferon kaj taksu ĝin ege grava.

#### Bibliografio

- Minell, Aulo, *Internacia Ortografio* (1973), Metilernejo de Mez-Finnlando, Jyväskylä.
- Scienca Revuo* 19, Beograd, (1968) p. 160; 20 (1969) p. 5, p. 43; 21 (1970) p. 104 - 106; p. 140; 22 (1971) p. 132, p. 207.
- Atanasov, A. D., *Bulgara Esperantisto* (1969) n-ro 3/4.
- Zamenhoff, L. L., *La Esperantisto* (1891) p. 88 - 92.
- Halvelik, Manuel, *Universala Skribo* (1966).
- Kalocsay, K. kaj Waringhien, G., *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* (1980).
- S.A.T., *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (1970).
- Öhmann, Emil, *Kieli ja kulttuuri* (1964).
- Itkonen, Erkki kaj Jokinen, Raija, *Tiedon portaat* 5 (1968), Kielitiede.
- Adreso de la aŭtoro: Aulo MINELL  
Laurinkatu 17  
FI-41160 TIKKAKOSKI  
FINNLANDO  
E-poŝto: aulo.minell@pp.inet.fi



- 1. BPM
- 2. FV
- 3. CDTN
- 3. LR
- 3. SZ
- 3.4. ĈĜ
- 4. ĴŜ
- 5. J
- 6. GKĤ
- 6.7. H

